# tejo:aktuale

n° 512 | Januaro 2026

**Karaj abonantoj, bonvenon al la nova jaro 2026!** ✨✨

Nova jaro signifas novajn komencojn, freŝajn ideojn kaj renovigitan energion por nia komuna movado. Post la intensa jarfino, la volontula vivo en TEJO denove ekrapidas, plena je planoj, projektoj kaj internacia kunlaboro.

Ĉu vi jam pensis pri viaj **bonaj proponoj** por la nova jaro?
Inspiriĝu de **mallonga filmeto** kun la proponoj de kelkaj esperantistaj amikoj.
Kaj se vi ankoraŭ serĉas ideon… ni kuraĝigas vin inkluzivi **TEJO-n** inter viaj bonaj proponoj: fariĝi **membro aŭ patrono** kaj tiel subteni la junularan Esperanto-movadon. ☺

## ALVOKOJ




### (Re)membriĝu en TEJO!

Kiel membro de TEJO, vi ricevas:
🗞 la revuon Kontakto;
rabaton por IJK kaj aliaj eventoj;
eblon partopreni en trejnadoj;
eblon engaĝiĝi en riĉa internacia agado.
Kaj tre grave: **vi helpas la junularan Esperanto-movadon!**

Membriĝu nun




### Kunorganizu kun TEJO la IJK-n 2027 en via lando!

Organizu kune kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) la 83-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en via lando en 2027.
La limdato estis plilongigita!

Kandidatiĝu **ĝis la 16-a de februaro 2026.**
Pli da informoj

### Alvoko por videomuntisto

Se vi estas entuziasma junulo, kiu jam havas fakajn sciojn kaj sperton pri videomuntado, interesiĝas pri interkulturaj




dialogoj kaj konflikttransformado, vi povas kandidatiĝi esprimante vian motivon videomunti **filmon de seminario de TEJO.** 🎬

Kandidatiĝu **ĝis merkredo, la 4-a de februaro 2026.**

---

# ARTIKOLO




## Junuloj por Eŭropo: TEJO-seminario en Kipro

Legu la artikolon de Kjara, TEJO-volontulo, pri ŝia sperto en la seminario:

Dum kvin tagoj 20 junuloj el diversaj eŭropaj landoj traktis temojn kiel **interkultura dialogo**, **konflikttransformado** kaj **packonstruado**, esplorante kaj tutmondan perspektivon kaj la kompleksan historion kaj politikan realecon de la insulo.

---

# EVENTOJ




## Partoprenu en IJF

La Internacia Junulara Festivalo (IJF) okazos en Cervia (Italio) de la 1-a ĝis la 7-a de aprilo 2026.

Ĝi estas la perfekta okazo por:
✨ renkonti junulojn el multaj landoj;
🌍 esplori malsamajn kulturojn kaj perspektivojn;
praktiki Esperanton nature;
sperti koncertojn, spektaklojn kaj temajn vesperojn;
malkovri italajn urbojn kaj lokajn komunumojn;
partopreni en laborrenkontiĝoj, debatoj kaj kreivaj agadoj;
🎮 kundividi ludojn, sportojn kaj neformalajn momentojn;
pasigi longajn vesperojn... kaj eĉ pli longajn noktojn!




## Aliĝu al IJK plej favorpreze!

Je la 31-a de januaro **(hodiaŭ!) finiĝos la unua aliĝperiodo de la 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)**, okazonta en Tiana, Katalunio, de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026. Ne maltrafu ĉi tiun ŝancon aliĝi kontraŭ la plej favorprezaj kotizoj!

Ĝis nun aliĝis 98 homoj kaj vi ankaŭ povas aliĝi al tiu daŭre plilongiĝanta listo!

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**




Februaro estas la monato, kiam la novjaraj promesoj jam komencas fendiĝi, sed ankoraŭ ne sufiĉe por ke ni konfesu tion laŭte. La steloj rimarkas kreskantan lacecon en la Esperanta universo: tro da retkunvenoj, tro da "nur mallonga punkto" kaj tro da dokumentoj kun la vorto *fina* en la titolo. Sed ne timu! Februaro alportas ankaŭ varmon: neatenditan mesaĝon, subitan inspiron, aŭ tiun senton ke, malgraŭ ĉio, la movado ankoraŭ vivas. Kaj vi kun ĝi.




♈ Via energio estas denove tro granda por la monato. En februaro vi eniros diskutojn kun la frazo "mi nur rapide diru ion", kaj eliros 40 mesaĝojn poste. La steloj konsilas: **ne ĉiu batalo devas esti la via.** Sed unu projekto, kiun ĉiuj aliaj timas komenci? Jes, vi jam faras tion. Denove.




♉ Vi sentas bezonon de stabileco en kaosa sezono. Februaro estas perfekta por vi: dum aliaj plendas, vi silente prizorgas la praktikan flankon de aferoj. Iu iam dankos vin. Eble ne ĉi-monate, sed kosme, certe. Konsilo: **ne ĉiuj krizoj estas viaj respondecoj**. 🛡




♊ Februaro estas komunikada labirinto, kaj vi kuras en ĝi kun ĝojo. Vi respondas mesaĝojn en la malĝusta babilo, miksas diskutojn, kaj subite rimarkas, ke vi promesis tri malsamajn aferojn al tri malsamaj homoj, ĉiuj "por la sama projekto". La steloj konsilas: **ne ĉio bezonas tuj reagon.** Sed vi reagos ĉiuokaze. Kaj, iel, la aferoj tamen funkcios. 🎭

♋ Februaro tuŝas vin profunde. Vi rimarkas ĉiun silenton, ĉiun prokrastitan respondon, ĉiun "ni parolu poste". En la movado vi




sentas vin kvazaŭ gardanto de la etoso, eĉ kiam neniu tion petis. Bona novaĵo: unu sincera konversacio remetos vin en ekvilibron. Malpli bona novaĵo: vi rerigardos tiun konversacion en via kapo ankoraŭ dum tagoj. Konsilo de la steloj: **ne ĉio dependas de vi, kaj tio estas en ordo.** ✨




♌ Eĉ en mallonga monato, vi trovas manieron esti centre. Februaro donas al vi scenejon, eble retan, eble tre malgrandan, sed vi brilos. La steloj tamen avertas: ne ĉiu silento estas malaplaŭdo. **Foje homoj simple estas lacaj. Ankaŭ tio estas en ordo.** 🕊




♍ Vi rimarkas ĉion, kio ne funkcias. Kaj en februaro vi decidas ripari almenaŭ du el tiuj aferoj. Perfekta monato por korekti, reorganizi kaj plibonigi, sed memoru: **vi ne devas savi la tutan sistemon sola**. Eĉ se vi teknike povus. 🛠📋✨




♎ Februaro alportas al vi delikatan taskon: esti la ponto inter du flankoj, kiuj forbruligis la ponton inter si kaj ne plu aŭskultas unu la alian. Vi faros tion elegante, eble eĉ humure. Bone elektita frazo (aŭ memeo) povos malstreĉi situacion. **Magio? Ne. Pesilo**. ⚖✨




♏ Februaro intensigas ĉion. Diskutoj fariĝas pli profundaj, decidoj ŝajnas definitivaj, kaj vi ne plu havas paciencon por supraĵaj paroloj. La steloj demandas: **ĉu vi volas venki debaton, aŭ vere transformi la situacion?** Se vi elektas la duan, vi povos krei ion fortan kaj daŭran. Se la unuan… ankaŭ tio estos memorinda. Elektu saĝe.




♐ Vi estas mense jam aliloke. Februaro vekas revon pri vojaĝo, evento aŭ projekto, kiu ankoraŭ ne ekzistas, sed certe devus. **Vi inspiros aliajn per via entuziasmo**. Detaloj? Buĝeto? Datrevenoj? Nu… poste.🌍 ✨😄




♑ Dum aliaj laciĝas, vi ankoraŭ tenas la fadenojn. Februaro estas peza, sed vi eltenas. La steloj tamen flustras: delegu. Jes, vere. Eĉ se tio signifas, ke iu faros ion “ne tute ĝuste”. **La mondo ne kolapsos. Promeso.**




♒ Vi sentas vin antaŭ la tempo. Denove. Februaro alportas ideon, kiun vi apenaŭ povas klarigi, sed vi sentas ke ĝi estas grava. Iuj ignoros vin. Unu persono diros: “ho, tio estas interesa”. **Tio sufiĉos por ke vi daŭrigu.**




♓ Februaro estas por vi mola, iom melankolia, sed bela. Vi rimarkas la etajn momentojn: mesaĝon skribitan kun zorgo, silenta subteno, komuna rido post longa kunveno. Vi memorigas la komunumon, ke ne ĉio mezureblas per rezultoj. **Kaj tio estas via magio.**




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2026 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands